



*inspiraj
rakontoj*



Tradukis Lode Van de Velde
Eldono Movado sen Nomo, 2015
ISBN 978-1-326-51752-6

*Tiu ĉi kolekto de 20 rakontoj
el diversaj mondpartoj
strebas inspiri
kaj pensigi vin
pri la ĉiutaga vivo.*



Enhavo

Enkonduko	7
Taso da Teo	9
La fiŝkaptanto kaj la komercisto	10
La rakonto de la eĥo	12
Du ranoj	13
La najloj en la barilo	14
La ĉarpentisto	15
Du fratoj	16
La ŝtona supo	17
La pioniroj	18
La perdita horloĝo	19
La krevita kruĉo	20
Pri la ĉielo kaj la infero	22
Du monaĥoj kaj virino	23
Kio estas bonŝanco?	24
La du lupoj	25
Sokrato kaj la tri kribriloj	26
Kial ni krias kiam ni koleras?	27
Eraro en la karaktero	28
Nur vizito	29
Budho minacata	30

Enkonduko

Tiom longe kiom ekzistas lingvo, ekzistas rakontoj. Ilia celo estis ĉefe transdoni informojn, ĉu historiajn, ĉu instruajn. Ili estas troveblaj en ĉiuj partoj de la mondo; la plej konataj estas tiuj pri la kreiĝo de la mondo.

Poste venis ankaŭ la distraj rakontoj. Eĉ la porinfanaj rakontoj kiel fabeloj originale havis instruan karakteron (moron), sed bedaŭrinde tiu trajto lastatempe malaperis el la komercaj produktaĵoj.

Per tiu ĉi kolekto, ni celas oferti al la legantoj mallongajn, sed tre inspirajn rakontojn, kiuj permesas iomete pripensi kaj mediti, sed nepre sen prediki.

La unua rakonto en la kolekto estas sendube la plej konata 'zen'-rakonto, sed ĝi estas tiel baza, ke ĝi nepre ne manku en tiu ĉi kolekto.

Ni esperas ke vi ĝuos la rakontojn kaj ke ili povos kontribui al pli konscia vivo.

Movado sen Nomo



ZEN
禪

Taso da Teo

Nan-in, Japana mastro el la Meiji epoko (1868-1912), ricevis viziton de universitata profesoro kiu venis informiĝi pri 'Zen'.

Nan-in servis teon. Li tute plenigis la tason de sia vizitanto per teo, sed ne ĉesigis la verŝadon.

La profesoro observis la troverŝadon de la teo ĝis kiam li ne plu povis resti sen reago.

"Ĝi estas plena jam. Plu nenio povas eniri!"

"Kiel tiu ĉi taso, diris Nan-in, vi estas plena je viaj propraj opinioj kaj supozoj. Kiamaniere mi povas instrui al vi pri 'Zen' se via kapo estas jam plena, kiel tiu taso?"

La fiŝkaptanto kaj la komercisto

Tre sukcesa komercisto promenis ĉe la kajo de malgranda vilaĝo en Meksiko, kie li vidis malgrandan boaton kun nur unu fiŝkaptanto kaj kelkaj grandaj tinuso-fiŝoj.

La komercisto komplimentis lin pro la bona kvalito de la fiŝo kaj demandis lin kiom da tempo li bezonis por kapti ilin. La meksikano respondis ke li fiŝkaptas nur 3 horojn tage.

Surprizita, la komercisto demandis kial la fiŝkaptanto ne restis pli longe por kapti pli da fiŝoj.

La meksikano diris ke li havis sufiĉe por subteni sian familion.

La komercisto poste demandis kion li faras dum la resto de sia tempo.

La meksikano diris: Mi dormas longe, ludas kun miaj infanoj, ĝuas posttagmezan dormon kun mia edzino Maria, promenas en la vilaĝo kie mi trinkas vinon kaj ludas gitaron kun miaj geamikoj kaj ripozas sur la plaĝo.

Nun la komercisto opinias ke li instruu ion al la simpla meksikano.

"Mi studis je Harvard universitato, havas diplomon pri komerco kaj povas helpi vin. Vi devus fiŝkapti pli longe kaj per la gajno aĉeti pli grandan boaton. Per tiu gajno, vi povos poste aĉeti plurajn boatojn."

"Sed kio poste, sinjoro?" demandis la fiŝkaptanto.

Iom iritita pro la demando, la komercisto respondis:

"Anstataŭ vendi la fiŝon al unuopuloj, vi povos vendi ilin rekte al fabriko kaj finfine malfermi vian propran fabrikon. Vi povos kontroli la varon, la produktadon kaj la distribuadon. Vi devos forlasi tiun ĉi malgrandan marbordan vilaĝon kaj translokiĝi al la ĉefurbo de Meksikio, poste Los Anĝeleso kaj finfine Novjorko, de kie vi povos direkti vian grandan entreprenon."

"Sed sinjoro, demandis la fiŝkaptisto, kiom longe ĉio tio daŭros?"

"15 aŭ 20 jarojn," respondis la komercisto.

"Kaj kio poste, sinjoro?"

Ankoraŭ pli senpacienca, la komercisto respondis: "En la ĝusta momento, vi povus eniri la borson, vendi akciojn kaj fariĝi tre riĉa. Vi povus gajni milionojn!"

"Milionojn, sinjoro? Kaj kio poste?"

Nun la komercisto tute perdis paciencon kaj elvokis:

"Ĉu vi ne komprenas ke vi estos tiom riĉa, ke vi neniam devus labori denove? Vi povus dormi longe, fiŝkapti iomete, ludi kun viaj infanoj, ĝui posttagmezan dormon kun via edzino, promeni en la vilaĝo kaj tie trinki vinon kaj ludi gitaron kun viaj geamikoj kaj ripozi sur la plaĝo. Vi ne devos zorgi pri io ajn en la mondo."

La fiŝkaptanto, tute trankvila diris:

"Kaj kion vi pensas ke mi jam faras nun?"

Poste li rigardis la bluan maron, kun sia fiŝbastano en la akvo, sed ajna zorgo.

(Brazila aŭ Meksika rakonto)

La rakonto de la eĥo

Bumerango revenas al ĵetinto, same kiel eĥo al parolinto. Jen estas bela rakonto kiu ilustras kio povas okazi en nia ĉiutaga vivo.

Patro kaj filo promenas en la arbaro. Subite la filo stumblas kaj ĉar li dolorigis al si la genuon, li krias: "Aaaaa!". Je sia surprizo, li aŭdas voĉon el la montoj kiu krias "Aaaaa"!

Plena je scivolemo li vokas : "Kiu vi estas?", sed la sola respondo kiun li ricevas estas: "Kiu vi estas?". Li koleriĝas kaj krias: "Vi estas senkuraĝulo!".

La voĉo respondas: "Vi estas senkuraĝulo!". La filo rigardas sian patron kaj demandas konfuzite: "Paĉjo, kio okazas ĉi tie?".

La patro respondas: "Filo, atentu!" kaj vokas: "Mi admiras vin!". La voĉo respondas: "Mi admiras vin!". La patro vokas: "Vi estas grandioza!" kaj la voĉo respondas: "Vi estas grandioza!".

La knabo estas tre surprizita, sed daŭre ne komprenas kio okazas.

La patro klarigas: "La homoj nomas tion ĉi EĤO, sed fakte tiel ĉi estas la VIVO! La vivo ĉiam redonas tion kion vi kontribuas. La vivo estas spegulo de viaj agoj. Se vi volas pli da amo, donu pli da amo. Se vi volas pli da afableco, donu pli da afableco! Se vi volas komprenon kaj respekton, donu komprenon kaj respekton. Se vi volas ke la homoj estu paciencaj kaj respektemaj kun vi, donu al ili paciencon kaj respekton. Tiu ĉi natura leĝo validas por ĉiuj aspektoj de nia vivo."

La vivo ĉiam redonas kion vi donis; ne estas koincido, sed spegulo de viaj agoj.

Du ranoj

Grupo da ranoj promenis tra arbaro kiam du el ili subite falis en profundan truon. Ĉiuj aliaj ranoj kuniĝis ĉirkaŭ la rando de la truon. Kiam ili vidis kiom profunda estis la truon, ili ekdiris ke ili certe mortos.

La du ranoj ignoris la komentojn kaj provis salti el la truon per ĉiuj siaj fortoj. La aliaj ranoj daŭre diris ke ili ĉesu, ĉar ili certe mortos. Finfine, unu el la ranoj obeis la kriojn de la aliaj ranoj kaj rezignis. Ĝi falis kaj mortis.

La alia rano daŭre saltis tiom forte kiom ĝi povis. Refoje, la aliaj ranoj kriis ke la peno ne havas sencon kaj ke ĝi simple mortu. Ĝi saltis ankoraŭ pli forte kaj finfine sukcesis eliri.

Verdire, la dua rano estis surda kaj ne povis aŭdi la aliajn ranojn. Ĝi simple kredis ke la aliaj ranoj kuraĝigis ĝin la tutan tempon.

Konklude: kredu je vi mem kaj ĉiam penu sincere por akiri tion kion vi volas; ne tuj kredu malkuraĝigajn homojn.

La najloj en la barilo

Iam vivis eta knabo kun malbona humoro. Lia patro donis al li sakon da najloj kaj diris ke ĉiufoje kiam li koleriĝas, li batu najlon en la malantaŭa flanko de la barilo. La unuan tagon, la knabo batis 37 najlojn en la barilon. Laŭ la paso de la semajnoj, lernante regi sian koleremon, la nombro de najloj tage malaltiĝis. Li malkovris ke estas pli facile ne koleriĝi ol bati najlojn en la barilon.

Finfine venis la tago kiam la knabo tute ne plu perdis paciencon. Li rakontis pri tio al sia patro kaj tiu proponis ke li ĉiutage kiam li sukcesis regi sin, li elprenu najlon el la barilo. La tagoj pasis kaj la junulo povis diri al sia patro ke ĉiuj najloj estas for. La patro prenis la manon de sia filo kaj akompanis lin ĝis la barilo.

Li diris, "Tre bone, mia filo, sed rigardu la truojn en la barilo. La barilo neniam estos la sama. Kiam vi eldiras vortojn al amiko dum kolero, ili lasos spurojn, cikatrojn kiel tiuj ĉi. Vi povas meti tranĉilon en personon kaj ree eltiri ĝin. Ne gravas kiom ofte vi pardonpetas, ĉar la vundo daŭre estos tie kaj verbala vundo estas same grava kiel fizika vundo."

La ĉarpentisto

Maljuna ĉarpentisto estis preta por sia emeritiĝo. Li rakontis al sia ĉefo pri siaj planoj rezigni pri la domkonstruado kaj vivi kun sia edzino kaj familio. La salajro mankus al li, sed li bezonis la liberan tempon kaj povos elturniĝi finance.

La ĉefo bedaŭris ke tiom bona laboristo foriros kaj petis lin konstrui nur unu plian domon, kiel persona favoro. La ĉarpentisto jesis, sed montriĝis ke li faris la laboron sen sia koro. Li neglektis la kutime zorgoplenan metilaboron kaj uzis malpli bonan materialon. Estis iom malfeliĉa maniero fini sian karieron.

Kiam la ĉarpentisto finis sian laboron kaj la ĉefo venis inspekti la domon, li donis la ŝlosilon al la ĉarpentisto. "Jen via domo," li diris, "mia donaco al vi."

Kia ŝoko! Kia embaraso! Se li sciis ke li estis konstruanta sian propran domon, li estus laborinta tute alimaniere. Nun li devis vivi en la domo kiun li ne tiom bone konstruis.

Tiel estas kun ni. Ni konstruas niajn vivojn en neglektema maniero, reagante pli ol agante, preta akcepti malpli ol la plej bona. En gravaj momentoj ni ne laboras kun nia plej bona peno. Poste, ŝokita, ni devas fronti situacion kiun ni mem kreis kaj trovas nin mem vivanta en la domo kiun ni mem konstruis. Kun tiuj scioj, ni estus agintaj tute alimaniere.

Pensu pri vi mem kiel la ĉarpentisto. Pensu pri via domo. Ĉiutage kiam vi martelas najlon, instalas breton aŭ konstruas muron. Konstruu saĝe; estas la sola vivo kiun vi iam povos konstrui. Eĉ se vi vivos nur unu tagon pli, tiu tago devos esti vivata glore kaj digne. La ŝildo sur la muro tekstas "La vivo estas mem-farata projekto."

Kiu povus diri pli klare? Via vivo hodiaŭ estas la rezulto de viaj sintenoj kaj elektoj en la pasinteco. Via vivo morgaŭ estos la rezulto de la sintenoj kaj elektoj kiujn vi faras hodiaŭ.

Du fratoj

Jen estas rakonto pri du fratoj. Unu estis drogulo kaj ebrulo kiu regule batis sian edzinon kaj infanojn. La alia estis tre sukcesa komercisto, respektita en socio kaj kiu havis ĉarmajn edzinon kaj infanojn. Kelkaj homoj volis scii kial la du fratoj, kiuj devenis de la samaj gepatroj kaj grandiĝis en la sama hejmo, povis fariĝi tiel malsamaj.

Oni demandis la unuan: "Kial vi estas tia? Vi estas drogulo, ebrulo kaj kaj vi batas viajn edzinon kaj infanojn. Kio motivigas vin?"

Li respondis: "Mia patro."

Ili demandis, "Kio pri via patro?" La respondo estis: "Mia patro estis drogulo kaj ebrulo kiu regule batis sian edzinon kaj infanojn. Kion vi volas ke mi fariĝu? Jen tia kia mi estas."

Ili iris al la alia frato kiu estis pli sukcesa kaj faris la saman demandon. "Kial vi estas tia? Kial vi estas sukcesa kaj havas feliĉajn edzinon kaj infanojn? Kio motivigas vin?" Kaj diveni kion li respondis? "Mia patro."

Li daŭrigis: "Kiam mi estis eta knabo, mi ofte vidis mian patron ebria kaj farante malbonajn aferojn. Mi decidis, ke mi ne volus vivi tiel."

Ambaŭ ĉerpis siajn fortojn kaj motiviĝojn de la sama fonto, sed unu uzis ĝin negative kaj la alia pozitive.

La ŝtona supo

Antaŭ multaj jaroj, tri soldatoj, malsataj kaj mizeraj pro la batalo, alvenis al malgranda vilaĝo.

La vilaĝanoj, suferantaj pro magra rikolto kaj la multjara milito, rapide kaŝis la malmulton kiu restis al ili por manĝi. En la vilaĝa korto, ili skuis la manojn kaj plendis pro la manko de manĝaĵoj.

La soldatoj kviete parolis inter si kaj la unua soldato iris al la plej aĝaj vilaĝanoj.

'Viaj lacaj kampoj havas plu nenion por dividi, do ni dividos tion kion ni havas - la sekreto kiel fari supon el ŝtonoj.'

Kompreneble la vilaĝanoj estis intrigitaj kaj rapide fajro estis farita sub la plej granda kaldrono de la vilaĝo dum la soldatoj enmetis tri glatajn ŝtonojn.

'Nu, estos bongusta supo', diris la dua soldato; 'sed kun pinĉeto da salo kaj iom da poreo estus vere bongusta!'

Vilaĝanino eksaltis, kriante 'Kiom fortune! Mi ĵus memoras kie restas iom da!'

Tiam ŝi forkuris, revenante kun antaŭtuko plena je poreo kaj beto. Dum la kaldrono plubolis, la memoro de la vilaĝanoj pliboniĝis: baldaŭ hordeo, karotoj, bovaĵo kaj kremo finiĝis en la kaldrono, kaj barelo da vino estis rulita al la kortego dum ĉiuj eksidis por festi.

Ili manĝis kaj dancis kaj kantis tra la nokto, refreŝigita pro la festeno kaj iliaj novtrovitaj amikoj.

En la mateno kiam la tri soldatoj vekiĝis, ĉiuj vilaĝanoj staris antaŭ ili. Ĉe iliaj piedoj kuŝis sako kun la plej bonaj pano kaj fromaĝo de la vilaĝo. 'Vi donis al ni la plej grandan donacon - la sekreton kiel fari supon el ŝtonoj', diris maljunulo, 'kaj ni neniam forgesos'.

La tria soldato parolis al la vilaĝanaro, kaj diris: 'Ne estas sekreto, sed estas certe, ke nur dividante, ni povas fari festenon', tiam la soldatoj vagis for, laŭ la vojo.

La pioniroj

En la tempo kiam homoj vojaĝis okcidenten por trovi novan loĝlokon, iuj familioj alproksimiĝis al urbeto. Sur monteto antaŭ la urbo staris saĝa viro. La grupo haltis kaj la gvidanto demandis la saĝulon kia estas la urbeto.

La saĝulo respondis per demando: "Kiaj estas la homoj en la urbeto kiun vi ĵus forlasis?"

Iuj respondis "La urbeto de kie ni venas estas malica. La homoj arde klaĉas kaj profitas de senkulpaj homoj. Ĝi estas plena je ŝtelistoj kaj mensogantoj. "

La saĝa viro respondis: "Tiu ĉi estas sama kiel tiu kiun vi ĵus forlasis."

Ili dankis la saĝan viron ĉar li savis ilin de la sama sorto, kaj plu-vojaĝis okcidenten.

Poste alvenis alia grupo da homoj kiuj faris la saman demandon: "Kia estas tiu ĉi urbeto?"

La saĝulo denove demandis: "Kiaj estas la homoj en la urbeto kiun vi ĵus forlasis?"

Ili respondis, "Ĝi estas mirinda! Ni havas karajn geamikojn. Ĉiuj zorgas unu pri la alia. Neniam io mankas ĉar ni ĉiuj helpas unu la alian. Se iu havas grandan projekton, la tuta komunumo kolektiĝas por helpi. Estis malfacila decido foriri, sed ni sentis la bezonon glatigi la vojon por estontaj generacioj veturante okcidenten kiel pioniroj."

La saĝa viro respondis precize la samon kiel al la unua grupo: "Tiu ĉi estas sama kiel tiu kiun vi ĵus forlasis."

La homoj ĝoje respondis: "Ni ekloĝu tie ĉi!"

La perdita horloĝo

Iam estis farmisto kiu malkovris ke li perdis sian horloĝon en la stalo. Ne estis ordinara horloĝo ĉar ĝi havis sentimentan valoron por li. Post longa serĉado alte kaj malalte en la fojno dum longa tempo, li rezignis kaj petis grupon da infanoj kiuj ludas ekster la stalo.

Li promesis ke la persono kiu trovas ĝin, ricevos rekompencan.

Aŭdinte tion, la infanoj hastis en la stalon, tra iris kaj ĉirkaŭiris la tutan fojnon sed daŭre ne trovis la horloĝon. Ĝuste kiam la farmisto volis rezigni, eta knabo iris al li kaj demandis duan ŝancon.

La farmisto rigardis lin kaj pensis, "Kial ne? La infano ja aspektas sufiĉe sincera."

Do la farmisto sendis la etan knabon en la stalon. Iom poste la eta knabo eliris kun la horloĝo en sia mano! La farmisto estis samtempe ĝoja kaj surprizita kaj demandis la knabon kiamaniere li sukcesis dum ĉiuj aliaj malsukcesis.

La knabo respondis, "Mi faris nenion alian ol sidi sur la planko kaj aŭskulti. En la silento, mi aŭdis la horloĝon tiktaki kaj mi serĉis ĝin en tiun direkton."

Moralo: Paca menso povas pensi pli bone ol ŝarĝita menso. Permesu kelkajn minutojn da silento al via menso ĉiutage, kaj vidu, kiom akre tio helpas vin direkti vian vivon tiel kiel vi volas ke ĝi estu!

La krevita kruĉo

Akvoportisto en Barato havis du kruĉojn kiujn li portis ambaŭflanke de longa bastono sur siaj ŝultroj. Per tiuj ĉi du kruĉoj li portis akvon de la rivero al la domo de sia majstro. Unu el la kruĉoj estis krevita kaj dum la alia ĉiam alvenis plena, la krevita kruĉo fine de la vojo estis nur duone plena.

Kompreneble la perfekta kruĉo tre fieris pro ĝia laboro, kiu cetere tute kongruis al ĝia celo. Sed la krevita kruĉo hontis pro ĝia neperfekto kaj sentis malfeliĉon ĉar ĝi nur faris la duonon de la laboro por kiu ĝi estis farita.

Tiel pasis du jaroj ĝis la tago kiam la krevita kruĉo diris al la akvoportisto: "Verdire, mi hontas pro mi mem kaj volas pardonpeti pro tio."

"Kial?" scivolis la akvoportisto.

"Nu, dum la pasintaj du jaroj mi povis nur liveri duon de mia ŝarĝo pro la kreviĝo en mia flanko. Pro tiu ĉi malforta flanko, via laboro perdas efikecon kaj via laboro ne estas honorigita", respondis la kruĉo.



La akvoportisto kompatis la kruĉon kaj diris: "Kiam ni poste reiros al la domo de mia majstro, atentu la belajn florojn laŭlonge de la vojo."

Kaj efektive, dum ili grimpis la monteton, la malnova kruĉo rimarkis la belajn sovaĝajn florojn kiuj ĝuis la sunon ĉe la vojrandoj. Tio ĉi pligajigis ĝin. Sed je la fino de la vojo, ĝi daŭre sentis malbone ĉar ĝi refoje perdis duonon de ĝia ŝarĝo survoje. Kaj denove ĝi pardonpetis.

La akvoportisto diris al la kruĉo: "Ĉu vi ne rimarkis ke nur je via flanko de la vojo kreskas floroj? Tio okazis pro tio ke mi konis vian malfortan flankon kaj uzis ĝin pozitive. Mi semis florojn je via flanko de la vojo kaj vi akvumis ilin. Dank' al tio, jam dum du jaroj mi povas pluki buntajn florojn por ornamo la tablon de mia majstro. Sen vi, li devus malhavi tiun ĉi belecon."

Moralo: ĉiuj el ni havas sian malfortan flankon. Ni ĉiuj estas iomete kiel krevitaj kruĉoj. Sed estas ĝuste la malfortaj flankoj kaj kreviĝoj kiuj igas la kunvivadon interesa kaj meritplena. Ni simple devas akcepti ĉiujn homojn tiel kiel ili estas kaj aprezi la bonon en ĉiu homo. Estas multe da bono en la homoj. Kaj estas multe da bono en ni mem.

Pri la ĉielo kaj la infero

Granda, forta samurajo vizitis malgrandan monaĥon.

"Monaĥo", ordonis li en tono kiu ne toleris kontraŭdiron, "instruu al mi pri la ĉielo kaj la infero!"

La monaĥo suprenrigardis al la danĝeraspekta batalanton kaj respondis kun la plej eble granda malestimo:

"Instrui al vi pri la ĉielo kaj la infero? Mi povus instrui al vi nenion. Vi estas malpura, vi stinkas, via glavo estas rusta. Vi estas hontomakulo kiu embarasas la klason de samurajoj. Iru for. Mi ne povas elteni vian ĉeeston."

La samurajo furioziĝis. Li tremis, fariĝis ruĝa en la vizaĝo kaj mutiĝis pro kolero. Li elingigis la glavon, levis ĝin supren kaj pretiĝis por bati la monaĥon.

"Tio estas la infero", diris la monaĥo trankvile.

La samurajo estis perpleksa. La kompato kaj konfido de tiu ĉi eta viro kiu riskis sian vivon por montri al li la inferon!

Malrapide, li subenigis sian glavon, plena je dankemo kaj subite pacema.

"Jen la ĉielo", diris la monaĥo.

Du monaĥoj kaj virino

Du vojaĝantaj monaĥoj alvenis ĉe rivero, kie ili renkontis virinon. Pro tio ke la virino timis la akvofluan, ŝi petis la monaĥojn porti ŝin al la alia flanko.

Unu el la monaĥoj hezitis, sed la alia metis ŝin sur siajn ŝultrojn, transiris la akvon kaj metis ŝin sur la alian riverbordon. La virino dankis lin kaj foriris.

Dum la monaĥoj daŭrigis sian vojaĝon, unu el la monaĥoj estis tre silentema kaj pensema. Ne plu scipovanta silenti, li ekparolis pri tio kio ĝenas lin.

"Frato, nia spirita trejnado instruas al ni eviti ĉiun kontakton kun virinoj, sed vi levis ŝin sur viajn ŝultrojn kaj portis ŝin!"

"Frato", respondis la alia monaĥo, "mi deponis ŝin sur la alia riverbordo, sed ŝajne vi daŭre kunportas ŝin?!"



Kio estas bonŝanco?

Iam vivis farmisto kiu loĝis en malriĉa kampara vilaĝo. La farmisto estis konsiderata bonfarta, ĉar li posedis ĉevalon kiun li uzis por plugi kaj ankaŭ por transporti diversajn aferojn.

Iun tagon lia ĉevalo malaperis. Ĉiuj najbaroj kompatis lin, sed la farmisto diris nur "Aĥ, kio estas bonŝanco kaj kio estas malbonŝanco?"

Kelkajn tagojn poste, la ĉevalo revenis, akompanata de du aliaj, sovaĝaj ĉevaloj. La najbaroj trovis ke li nekredeble bonŝancis, sed la farmisto diris nur: "Aĥ, kio estas bonŝanco kaj kio estas malbonŝanco?"

La tagon poste, la filo de la farmisto provis rajdi unu el la sovaĝajn ĉevalojn. La ĉevalo deĵetis lin kaj la filo rompis kruron. La najbaroj ofertis sian kompaton pro la malfeliĉo, sed la farmisto diris nur: "Aĥ, kio estas bonŝanco kaj kio estas malbonŝanco?"

Unu semajnon poste venis militistoj al la vilaĝo por rekruti junajn virojn por la devigita militservo. La filon de la farmisto ili ne volis pro lia rompita kruro. Kiam la najbaroj diris al li ke li tamen ja bonŝancis, la farmisto diris nur: "Aĥ, kio estas bonŝanco kaj kio estas malbonŝanco?"

La du lupoj

Maljuna indiano prenis siajn prafilojn sur sian sinon.

Li diris: "Furiozas batalo profunde en mi. Batalo inter du lupoj. Unu lupo reprezentas ĝojon, pacon, esperon, malavaron, humilecon, ĝentilecon, empation, serenecon kaj amikecon.

La alia lupo reprezentas envion, koleron, ĉagrenon, egoismon, memkompaton, kulpon, malestimon, arogon kaj timon. La batalo ekzistas ankaŭ ene de vi, ĉiutage.

La infanoj iomete pripensis la diritaĵon, ĝis fine unu el la infanoj demandis: "Kaj kiu el la du lupoj venkas?"

Respondis la maljuna indiano: "Tiu lupo, kiun vi plej multe nutras."

(Ĉerokea legendo)



Sokrato kaj la tri kribriloj

Sokrato, la Greka filozofo, promenis tra la stratoj de Ateno. Subite viro ekscitite aliras lin. "Sokrato! Mi devas rakonti ion al vi pri via amiko kiu ..."

"Ho, atendu momenton", interrompis Sokrato. "Antaŭ ol vi daŭrigas. Ĉu vi kribris la rakonton kiun vi volas sciigi al mi tra la tri kribriloj?"

"La tri kribriloj? Kiuj tri kribriloj?", demandis la viro surprizite.

"Ni provu", proponis Sokrato.

"La unua kribrilo estas tiu de la vero. Ĉu vi ekzamenis la verecon de tio kion vi volas rakonti al mi?"

"Ne, mi aŭdis la rakonton kaj ..."

"Do bone. Tiukaze, almenaŭ ĝi trairis la duan kribrilon? La kribrilon de la bono? Ĉu estas io bona, kion vi volas rakonti pri mia amiko?"

Hezite, la viro respondis "Nu, ne, ne estas. Male eĉ..."

"Hm", diris la filozofo. "Ni uzu la trian kribrilon. Ĉu estas necese ke vi rakontu tion kio tiel ekscitas vin?"

"Ne, ne nepre necese", respondis la viro.

"Nu", diris Sokrato ridetante. "Se la rakonto kiun vi volas komuniki ne estas vera, ne estas bona kaj ne estas necesa, bonvolu forgesi ĝin kaj ne ĝenu min pri tio."

Kial ni krias kiam ni koleras?

Hindua saĝulo kiu vizitis la riveron Gango por bani sin, vidis grupon de familianoj kiuj kriis unu al la alia. Li turnis sin al siaj lernantoj, ridetis kaj demandis: "Kial tiuj ĉi homoj krias unu al la alia kiam ili koleras?"

La lernantoj cerbumis dum iom da tempo, ĝis kiam unu el ili diris: "Ĉar ni perdas nian trankvilon, ni krias."

"Sed kial krii se la persono staras apud vi? Eblas same bone diri la direndaĵon mallaŭte," diris la saĝulo.

La lernantoj donis diversajn respondojn, sed neniu respondo povis kontentigi la aliajn lernantojn.

Finfine la saĝulo donis la jenan klarigon: "Kiam du homoj koleras, estiĝas distanco inter iliaj koroj. Por malgrandigi tiun distancon, ili devas krii unu al la alia. Ju pli ili koleras, despli ili devas krii por aŭdi unu la alian, por ke la distanco inter ili malgrandiĝu.

Kio okazas kiam du homoj amas unu la alian? Ili ne krias, ili parolas mallaŭte, ĉar iliaj koroj estas proksime konektitaj. La distanco inter la koroj estas ege malgranda aŭ eĉ ne ekzistas."

La saĝulo daŭrigis sian klarigon: "Kiam ili ankoraŭ pli amas unu la alian, kio okazas? Ili ne plu parolas, sed flustras unu al la alia kaj tiumaniere ankoraŭ pli proksimiĝas. Finfine ili eĉ ne plu devas flustri, rigardo sufiĉas por kompreni unu la alian. Jen kiel kondutas du personoj kiuj amas unu la alian."

Li rigardis siajn lernantojn kaj konkludis: "Do kiam vi diskutas, atentu pri tio ke viaj koroj ne distanciĝu unu de la alia. Ne diru vortojn kiuj ankoraŭ pli grandigas la distancon. Alikaze la distanco fariĝos tiel granda, ke vi ne plu retrovos la vojon por reiri."

Eraro en la karaktero

Mishumorema maljuna monaĥo ofte koleriĝis. Li profunde hontis pro sia konduto kaj decidis iun tagon: "Estas plej bone por ĉiuj, ke mi forlasu la komunumon por retiriĝi en la dezerto, kie mi ĝenos neniun."

Li ekiris kaj ekde tiu tago vivis sola en kaverno.

Iun tagon li iris kun kruĉo al fonto por serĉi akvon. Li metis la plenan kruĉon sur la teron, sed ĝi falis. Li plenigis ĝin denove, sed refoje ĝi falis.

Furioza, li ĵetis la kruĉon sur la teron, tiel ke ĝi disfalis en mil pecojn.

La malriĉa ermito, hontema pro sia reago, lernis el sia eraro: por korekti eraron en la karaktero, oni ne forkuru de ĝi, sed oni venku ĝin.

Nur vizito

Pasintan jarcenton, turisto el Usono vizitis la faman polan rabenon Hafez Hayyim.

Li surpriziĝis vidante ke la loĝejo de la rabeno konsistis nur el simpla ĉambro plena je libroj kaj kiel meblaro nur tablo kaj sofo.

"Rabeno, kie estas viaj aliaj aferoj?" demandis la turisto.

"Kie estas viaj aferoj?", demandis Hafez.

"Miaj? Sed mi nur venis ĉi tien por vizito."

"Ankaŭ mi", diris la rabeno.

(Anthony de Mello)

Budho minacata

Unu tagon, Budho estis mortminacata de bandito nomita Angulimal.

"Bonvolu unue plenumi mian lastan antaŭmortan deziron," diris Budho. "Fortranĉu branĉon de tiu arbo."

Unu bato per la glavo, kaj estis farita!

"Nun, kio?" demandis la bandito.

"Remetu ĝin," diris Budho.

La bandito ridis. "Vi devas esti freneza pensante ke iu ajn povus fari tion."

"Tute male," respondis Budho. "Estas vi kiu estas freneza pensante ke vi estas grandioza ĉar vi kapablas vundi kaj detrui. Tio estas afero de infanoj. La veraj grandiozuloj scias kiamaniere krei kaj kuraci."

(Anthony de Mello)



ZEN
禪

